






№ 01
1966

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviario



=====

AVVISO DEL CASSIERE

=====

Si é chiuso l'anno solare ed ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per l'anno 1966. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli anni scorsi, per cui preghiamo vivamente tutti ad inviare le quote urgentemente a mezzo del C.C.P. n° 8/24094, oppure due righe di dimissioni. Rammentiamo che le quote per il 1966 sono £.2500 o 1000.

Chi riceve il presente "INFORMA BULTENO-ITALA FERVOJISTO" e non intende riceverlo ulteriormente, e non ha interesse al nostro movimento è pregato di farlo presente alla redazione: Via Donato Creti, 61 Bologna.

Grazie anticipate.

VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE SOCIALI!

SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE - ADERITE ALL'I.F.E.A.!

=====

PRI LA ESPERANTA PILGRIMADO AL PALESTINO

=====

La 26-an de aùgusto je la 7 h. akurate la aùtobuso, ornamita per esperantaj flagetoj, forlasis Placon "Romon" en Venezia kaj ekkomencis sian longegan veturadon. Post la landlimo Ferneti, ni tuj en Postumia renkontis samideanojn: kaj preskaù ĉie ili amase alvenis por saluti kaj festi nin. En Zagrebo ili akompanis nin en la vizito de la urbo kaj katedralo por omaĝi la tombon de Kardinalo Stepinac.

Beogrado kun la mirinda vidaĵo de la aera teraso de nia 18 etaĝa hotelo Slavija sur la nokta lumigita urbo, kaj la akcepto en la esperanta klubejo plenigis niajn korojn je plezuro kaj ĝojo.

Sed estis en Bulgarujo ke la esperanta akcepto atingis la plej altan supron de entuziasmo kaj amikeco. Jam en Sofio multaj niaj konatuloj kaj korespondantoj, amasiĝis en la salonoj de la hotelo Balkan. En Plovdivo estis tiom da personoj ke mi opiniis ke neniu esperantisto de la urbo mankis. Ankaù tie ni vizitis krom la belaĵojn de la urbo, ilian klubejon dediĉita al "Leonardo Da Vinci". Kiel priskribi kion atendis nin sur la ŝoseo de Asenovgrad? La tuta strato estis plenplena da personoj el ĉiuj medioj, kamparanoj, laboristoj, virinoj, infanoj, svingante florojn: parfumaj rozoj plenigis niajn manojn, du korboj el blanka belega vinbero kaj persikoj oni enŝovis en nian aùtobuson.

Nia vojo trapasis la fabelan Turkujon, kies Istambulo estas la tria mondfama haveno pro ĝia beleco kun la Bosforo kiun ni ŝipveturis ĝis ĝia enfluo en la Nigra Maro. Ni vizitis mirindajn moskeojn, monumentojn, la faman Serajlon de la iama Sultano, kun ĝiaj ĝardenoj kaj neimageblaj trezoroj.

Transirante per pramŝipo al Azio, atendis nin la plej ŝanĝeblaj pejzaĝoj: jen orkoloraj dezertoj el anatolia altebenaĵo, jen la kolosa ĉefurbo Ankaro, plena je ĉielskrapantoj kaj lumkoloraj fontanoj. Poste la sala lago Tuz arĝenta spegulo kies salo kovras rokojn kiel diamantoj. Senfinaj arbaroj de la ĉenmontaro Taurus, kaj la famaj "Ciciliaj Pordoj" kruta fendo de altegaj rokoj. La kotonkampoj de Adena, kaj la kortuŝa funebra ceremonio en Iskenderuno por memori la fervoran esperantan misiiston Patro E. Jacobitti entombigita en malgranda preĝejo. Ensorĉa festivalo tra ciklopaj ruinoj de Baalbek: Damasko poste, kun la memoroj de Sankta Paŭlo, moskeo Ommayadi kun tombo de Saladino.

Nia longa veturado alproksimiĝas al la celo. Jen Amman ĉefurbo de Jordanio, kaj la unuaj lokoj de la Sankta Lando. La Morta Maro 400 metrojn sub la marnivelo: la Jordanrivero kaj la loko de la bapto de Jesuo: la ĝardenoj de Geriko, la terura ŝtona vojo kiu, tra la dezerto de Judeo, kondukas al Jerusalemo. La vizito al ĉiuj sanktaj lokoj estis, por ni fideluloj, rava, spirita ĝojo; sur la Tombo, la Kalvario, la Stono de la Suferado emocie ni surgeniĝis. Jen la luma gracoplena Groto de Betlehemo kie naskiĝis Nia Savinto.

La 9-an de septembro okazis la inaùguro de la panelo "Patro Nia". Ĉeestis multaj personoj, krom ni pilgrimantoj. Post la malkovro kaj beno, araba virino legis bonvenon je la nomo de la araba popolo.

Tra la Mandelbaum Pordo ni eniris la israelan parton de Palestino. Tie, gvidataj de Prof-ro Kohen-Cedek, atendis gesamideanoj kiuj akompanis nin al Ain Karem kie oni celebris esperantan Meson kaj oni inaùguris la panelon "Magnificat" esperantlingve.

La veran ĝardenon ni ĝuis ŝipveturante la Genazareton Maron, vidante la monton de la Beatecoj, la Monton Tabor kaj la modernan Tel Aviv. Fine ni devis forlasi tiun ravan landon kaj enŝipiĝi ĉe la haveno de Haifa.

Post kvin tagoj de sunplena ŝipvetura, alternante niajn ripozojn kun la vizitoj al Cipro, Rodi kaj al impona Akropolo de Ateno, la 19-an de septembro feliĉe kaj triunfe ni eniris la havenon de Venecio.

Prof-ino Rosa MAUDENTE

=====

ĜENERALA JARKUNVENO EN LYONO DE F.F.E.A.

=====

Dimanĉon la 28-an de novembro, okazis en Lyono la ĝenerala jarkunveno de la francaj Fervojoj Esperantistoj. En etoso de frata kamaradeco kunvenis gefervojoj el ĉiu parto de Francio kaj de Germanio, Italio, Skotlando kaj Svislando.

La ĉefaj punktoj traktataj, krom la aprobo de la financa budĝeto, estis la sango de kelkaj eroj en la Statuto kaj la elekto de la nova estraro. Multaj gejunuloj ĉeestis, kaj tio donis al ni grandan plezuron, ĉar ni estas certaj tiel, ke novaj fortoj kaj pli junaj, ne nur daŭrigos nian laboron sed donos al la movadon impulson, energion kaj disvolviĝon.

Ni alvenis en Lyono, de Italio, vendrede posttagmeze kaj danke al fraŭlino Anny Payet al sia Patro al Sinjoroj Maury kaj Giovenal ni povis tuj senti nin kiel hejme. Sabate matene ni vizitis la grandan, belan kaj laboreman urbon kaj povis admiri du el la plej belaj preĝejoj kiujn ĝis nun ni vidis: la Katedralo Saint-Jean kaj la Baziliko Notre Dame de Fourvière.

Sabate vespere la juna kantoĥoro de la fervojistoj de Lyono kantis por ni tipaj folkloraj kantoj de Antiloj, Rusujo kaj Francio, kaj tuj poste estis prezentitaj filmoj pri la Hamar-a Kongreso kaj pri la ski-feriosemajno en Aŭstrio. La filmoj, tre interesaj, rivivigis al ni la travivaĵojn de la lasta fervojista kongreso kaj instigis la ĉeestantajn junulojn kaj eks junulojn partopreni la venontan feriosemajnon. La ĉiam aktiva fervojista junulargrupo de Parizo, kiel kutime, prezentis kelkajn memverkitajn teatraĵojn. Estis preskaŭ noktomeze kiam ni rapide iris al nia hotelo.

Dimanĉe matene, kiel aŭskultantoj ni partoprenis la francan kunvenon, kaj portis al ĝi niajn salutojn. En la salono plenplena, ĉe la prezida tablo krom la estraro de F.F.E.A., sidis la juna aktiva Prezidanto de la Lyona Grupo kolego Gabriel Laheurte kaj la simpatia kaj kompetenta S-ro Dord, Prezidanto de la Sud-Orienta Komitato de U.A.I.C.F. (Arta kaj Intelekta Unuiĝo de Francaj Fervojoj) kiu reprezentis S-ron Mollion, Prezidanto de F.S.A.I.C. S-ro Dord estris la kunvenon kaj tre varme parolis favore al nia movado kaj donis sincerajn laŭdojn pri la frata sento kiu ligas la esperantistojn.

Post la elekto de la nova estraro, ĉiuj kune, ni iris al unu el la plej malnovaj domoj de Lyono, nun fama restoracio "Les Trois Maries" kie luksa bankedo atendis nin. Altetaksita punkto en franca kunveno estas ĉiam la neforgesebla bankedo.

La kunveno finis per prezento de belegaj diapozitivoj, fare de iu Germana Esperantisto, kiu vizitis la U.E.A.-an kongreson en Tokio, kaj Koreujon, Delvina GIMELLI

=====

VARBADA KAMPANJO DE E.P.Ĉ.

=====

"El Popola Ĉinio" estas populara Esperanta gazeto eldonata de Ĉina Esperanto Ligo. Kun sinteza enhavo, riĉaj ilustraĵoj, belkoloraj bildopaĝoj, modesta prezo kaj favoraj donacaĵoj ĝi estas vaste bonvenigata de diverslandaj esperantistoj kiel leginda esperantaĵo. Nun jam komenciĝis la varbada kampanjo por kolekti novajn abonantojn per E.P.Ĉ. Enaboniĝantoj povas senpage ricevi belan Esperantan Kalendaron de 1966 por ornamo sian ĉambron kaj la plifruaj enaboniĝantoj povas ricevi ankoraŭ memoran notlibreton, kiu estas utila kaj por ĉiutaga notado kaj por propagando de Esperanto.

Tuj abonu E.P.Ĉ. ĉe ĝiaj perantoj. Se elsendi monon estas malfacile, vi povas enaboniĝi kredite ĉe la Libroservo de Ĉ.E.L., P.O.Kesto 313, Pekino Ĉinio. Detalan prospekton kaj seŭpagan provspecimenon oni sendos al la petan-

IOM PRI LA 9-a INTERNACIA SEMINARIO DE G.E.J.

Danke al la aranĝoj de Germana Esperanto-Junularo renkontiĝis en Hamburgo gejunuloj el 16 nacioj al la 9-a Seminario.

Certe la temo "li kaj ŝi" estis tre interesa kaj alloga, ĉar rilatoj inter viro kaj virino, sentimentalaj aŭ seksaj, naturaj aŭ romantikaj ke ili estu, ludis, ludas kaj ludos ĉefan rolon en la vivo; oni povus diri amo estas risorto kiu movigas la mondon.

Forlasante tabuojn kaj falsajn prudecojn, oni efike kaj sincere diskutis por starigi validan koncepton pri amo. Koncepto de nia hodiaŭa socio pri amo kaj sekso kiu ja mankas, almenaŭ en multaj landoj de eŭropa kulturo.

La plej aĝaj kaj spertaj generacioj, el kiuj devus deveni al la junaj, preparon kaj helpon por la vivo, silentas pri unu el la plej gravaj kaj aktualaj faktoj de la vivo, kaj silentas, ĉar ofte ili mem ne scias kion diri, kion pensi pri tio, kaj pri tio hontas paroli. Kiam ili silentas estas bone kaj mirinde ke la junuloj mem kolektiĝas por trovi per si mem, sinhelpante unu la alian, respondon kaj eblan solvon al tiu grava vivproblemo.

Tio pri la temo kaj la laboroj; kaj pri la urbo, grandega kaj interesa, pri la gepartoprenantaro, atenta kaj simpatia, pri la organizado, (mi mencias nur la Silvestran balon) kion diri? Ĉion eblan bonon! Ĉio estis laŭ la jam antaŭokjare eksperimentita famo de la G.E.J.-Seminarioj.

Pro tio nur restas por diri "Ĝis revido la venontan Seminarion".

Gianluigi GIMELLI

NOVAĴOJ EL ĈEĤOSLOVAKIO

De nia karega amiko Inĝ. Bohumil Král, okaze de la Jarfinaj Festoj, ni ricevis jenan leteron subskribita ankaŭ de S-ro Václav Srb, Prezidanto de Sindikata Komitato de Ministerio por Trafiko en Praha:

"Al fino de la jaro 1965 ni esprimas al vi en la nomo de niaj Esperantistaj fervojistoj sinceran dankon pro ĉio kion vi faris por nia Esperanto-Movado, pro ĉiuj viaj bonaj konsiloj kaj komprenemo. Ni ĝojas ke ankaŭ venontjare nia kunlaboro estos bona kaj utila. Ni deziras al vi, kara samideano sekretario, al via familio, al la IFEA-Estraro kaj al ĉiuj Esperantistaj fervojistoj kaj gesamideanoj en via lando plensanon kaj kontenton en la nova jaro 1966. Por via informo ni sciigas ke al nia Esperanto-klubo fervojista en Praha aliĝis pli ol 150 membroj kaj al nia Landa fervojista Esperanto-Sekcio entute 220 anoj. En majo 1965 estis 260 membroj. Ni klopodas nun pri bona organizado kaj kunlaboro enlande kaj eksterlande.

Esperanto-kursojn en nia Ministerio vizitadas preskaŭ 80 fervojistoj (komencantoj kaj progresintoj) kiujn instruas nia S-ano Bohumil Král. Esperanto-kursojn por fervojistoj oni aranĝas ankoraŭ en la grava stacidomo Česká Třebová kie ekzistas ankaŭ la koresponda kurso por tiuj fervojistoj el nia lando kiuj pro deĵoroj ne povas persone ĉeestadi kurson, plue en la fervojstacio Most kaj en la malgranda fervojstacio Řevnice 23 km. de Praha. "

Ni kore reciprokas al niaj Ĉeĥoslovakaj kolegoj la plej varmajn bondezirojn kaj sincere gratulas pro tiu imitinda ekzemplo kaj pro la bonega laboro farita por nia celo.

VI-a MANTOVA ESPERANTA TAGO

La Mantova Esperanto-Grupo estas feliĉa sciigi ke la 9-an de majo 1966 okazos la: VI-a MANTOVA ESPERANTA TAGO. Tiu Turisma-kultura manifestacio, celas kunigi en Mantova la plej eble grandan nombron da Esperantistoj kaj simpatiantoj por paroli pri la komunaj problemoj, revidi ma malnovajn geamikecojn kaj koni la novajn. Estas antaŭvidata ekskurso al SABBIONETA "la malgranda Ateno de la Gonzaga familio".

Karaj gesamideanoj la VI-a Mantova Esperanta Tago atendas vin! Notu bone la daton!

Mantova Esperanto-Grupo - Turisma Fako

INTERNACIA AŬTOMOBIL-EKSPozICIO

De la 3-a ĝis la 14-a de novembro okazis en Torino (Italujo) kutima internacia aŭtomobil-ekspozicio, dum kiu S-ino U.Grattapaglia deĵoris kiel Esperanto-interpretistino kaj disdonis Esperanto-prospektojn.

===== R E C E N Z O J =====

Priruĉnik za konverzaciju. Eld. Jugoslaviaj Fervojoj, Beograd, jaro 1965, 38 paĝoj 20x13 cm. Fervoja frazlibreto serba-franca-germana-angla-itala-esperanta. Prezo 1,80 nederlandaj guldenoj.

La fervojaj administracioj troviĝas en la embaraso, ke la trajnpersonaro ne regas sufiĉe da fremdaj lingvoj. Tial la Jugoslaviaj Fervojoj eldonis broŝuron kun preparitaj demandoj kaj respondoj en ses lingvoj. Inter tiuj troviĝas ankaŭ Esperanto. Enkonduke la alparolita persono estas petata montri en la broŝuro la deziratan lingvon kaj serĉi la koncernan demandon. Numerala sistemo ebligas trovi la tradukon. La sistemo ne estas nova kaj ne taŭgas en ĉiuj situacioj. Sed la trajna personaro disponas almenaŭ pri lingva helpilo Gratulon al la jugoslavaj fervojistoj, kiuj instigis sian administracion apliki Esperanton en tiu medio, same kiel jam en horaro kaj prospektoj. El "ESPERANTO" de U.E.A. n-ro 721 (12). W.Barnickel (Frankfurt/Main)

===== ESPERANTO-KURSOJ PER TELEVIDO =====

Sub la respondeco de la sekretario pri Edukado de la Ŝtato S.Paŭlo (Brazilo) kaj dank' al kunlaboro de S.Paŭlo Esperanto-Asocio, okazis en la urbo S.Paŭlo, ĉe la kanaloj 2 kaj 5, la unuaj Esperanto-kursoj per televido prezentitaj en Brazilo. La 8-an de julio, la Prezidanto de S.Paŭlo Esperanto-Asocio respondis, en televida programo ĉe la kanalo 5, dum unu horo kaj 20 minutoj, al demandoj pri Esperanto faritaj de la produktanto de la programo, S-ro Arruda Junior. La kurso ĉe la kanalo 2 komenciĝis per intervjuo kun la Prezidanto de S.P.E.A. (S-ro Adolfo Muniz Furtado) kaj al la Esperanto-instruistoj (S-roj Arnaldo Vianna kaj Walter Francini), farita de D-rino Marilia Antunes Alves, Estrino de la fako pri Ŝtata Lerneja Televido.

Laŭ la opinio de la televidrigardantoj, la lecionoj de Esperanto plene sukcesis kaj, pro la intereso vekita, oni kredas ke baldaŭ S.P.E.A. estos denove invitata por prezenti aliajn kursojn.

S.Paŭlo Esperanto-Asocio petas al esperantistoj de tuta mondo sendi salutkartojn al: Doktorino Marilia Antunes Alves, Strato Antonio de Godoi, 122, Sekretariejo Pri Edukado- S.Paŭlo (Brazilo), gratulante ŝin pro la starigo de pertelevida oficiala Esperanto-Kurso.

===== ESPERANTO EN LA SVISA RADIO =====

La Svisa Kurtonda Radiostacio, kiu bedaŭrinde devis komence de la jaro 1965 interrompi siajn Esperanto-elsendojn tradiciajn jam de post 1946, anoncas, ke ĝi denove elsendos en la internacia lingvo ekde la 7-a de novembro. Parolistoj estas la samaj kiel antaŭe, nome D-ro A.Baur, ĉefredaktoro en Bern, kaj C.Gacond, instruisto en La Sagnè/Neuchâtel. La ondoj estas 31,46 kaj 48,66 m. Lunde kaj merkrede je la 13 horo. Ĵaŭde kaj sabate je la 22,15 horo.

Ĉiu korespondanto ricevos regule ilustritan sendprogramon. La adreso estas: Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, Giacomettistr.1,3000 Bern 16, Svislando.

===== ESPERANTO EN RADIO =====

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - DISSENDOJ JARO 1966-a

La dissendoj okazas de h.17,35 ĝis h.17,50 (M.E.T.). Ondlongoj m.31,33=Mc/s. 9,57 kaj m.41,24=Mc/s.7,27. Redaktoro: Luigi MINNAJA.

FEBRUARO 1966-a: 2034 dimanĉon la 6-an: Luigi Capuana

2035 dimanĉon la 13-an: Italaj regionoj: Umbrio

2036 " 20-an: Italaj pentristoj: Tranquillo Cremona

2037 " 27-an: Letrkesto

MARTO 1966-a: 2038 dimanĉon: la 6-an: Tra la literaturo

2039 dimanĉon la 13-an: Novaĵoj el Italujo

2040 " 20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto

2041 " 27-an: La kastelo de Gradara

APRILO 1966-a: 2042 dimanĉon la 3-an: La italaj geologo Antonio Stoppani

2043 dimanĉon la 10-an: Italaj regionoj: Piemonto

2044 " 17-an: La romanika skulptarto en Modena: Wiligelmo

2045 " 24-an: Letrkesto.